# JES 2024/25: taga programo

(K) = taŭga por komencantoj
geschikt voor beginners
convient aux débutants
für Anfänger geeignet
suitable for beginners

## Spektakloj

### Verda Timo

**Gvidanto:** *Ikvero / Projekto TEATRE*

En ĉi-tiu horor-komedio, tri junaj esperantistoj alvenas nokte al stranga, danĝera kastelo. Bonvenigitaj de la timiga, flirtemega kaj vampireca mastro kaj sia seriozega maĵordomo, ĉu ili sukcesos travivi kaj malkovri la veron pri la esto kaj intencoj de la gastigantoj, aŭ ĉu ili simple stulte kverelos inter si?

“La perfekta Esperanta versio de The Rocky horror picture show”
—*Zamenhof*

### La Ŝaknovelo

**Gvidanto:** *Arno*

*La Ŝaknovelo*, la lasta verko de Stefan Zweig, estas emocia kaj psikologie profunda verko, kiu esploras la limojn de la homa menso en ekstremaj cirkonstancoj.

La teatra adaptado enscenigas la enigmajn rakontojn de la verko: vojaĝo sur ŝipo inter Nov-Jorko kaj Bonaero, kie ŝakludo interplektas la sortojn de unikaj personoj; la simpla, sed nevenkebla ŝakmajstro, kies peza aŭtomata ludo fascinas ĉiujn; kaj la tragika historio de Doktoro B., kiu, tenata en izoliteco fare de la nazioj, malkovras libron pri ŝakludo. Unue ĝi savas lian menson, sed poste ĝi puŝas lin al la rando de frenezo.

Ĉi-tiu rakonto pri homaj limoj estas riĉa je emociaj pintoj kaj nemaltrafinda travivaĵo.

### Mi aŭdas ion kion vi ne vidas (K)

*La mirakla besta mondo de Doktoro Vulpo*

**Gvidanto:** *Christoph*

Magia interaga teatro

Besta esploristo doktoro Vulpo malkovris mirindajn bestojn dum siaj vojaĝoj tra la mondo. Kelkaj el ĉi tiuj bestoj kun sensaciaj sensoj nun vivas kun li. Ekzemple, hundo Schnuffi povas odori nekredeble bone, la sovaĝa kato Kni-esel povas uzi sian sesan senton por trovi perditajn objektojn, la agla vulturo Chili vidas tiel bone, ke li povas rekoni objektojn de treege for, eĉ se ili estas kaŝitaj sub tuko.

Nekredeble magia, precipe kiam la publiko helpas ekscii la miraklajn kapablojn de la bestoj de doktoro Vulpo.

# Prelegoj

## Enkonduko al amatora radio

**Gvidanto:** *Matt*

Amatora radio estas internacia hobio per kiu homoj internacie povas komuniki per radio elsendoj. Mi parolas pri kio ĝi temas, kion ĝi bezonas kaj faros demonstron per miaj ekipaĵoj.

## Maŝinlernado: kio ĝi estas kaj kiel funkcias

**Gvidanto:** *Jacob*

Maŝinlernado kaj artefarita intelekto (AI) estas vaste uzata en multaj kampoj. Sed kiel funkcias maŝinlernado? Ĉu maŝinoj povas lerni, aŭ eĉ pensi? Kio signifas fakte 'lerni' kaj 'pensi'? Mi enkondukas vin al la kampo de maŝinlernado kaj montras kelkajn popularajn teknikojn. Vi aŭdos freneze strangajn vortojn kiel *loĝistika regreso*, la *subtenvektora maŝino*, kaj *neŭraj retoj*. Vi nur bezonas scii la koncepton de kalkultabelo (kun kolumnoj kaj vicoj) por kompreni la ideojn, eĉ se la klarigoj estas matematike ĝustaj. Lumbildoj: https://bit.ly/maŝinlernado

## Kiel funkcias artefarita intelekto (AI)?

**Gvidanto:** *Jacob*

La *generativa AI* donas revoluciajn eblojn imiti homan kreemon. Vi komprenos kiel tio funkcias – kiel maŝino povas babili kiel homo (ekzemple, la babilroboto ChatGTP), rekoni, plibonigi aŭ krei belajn bildojn, rezumi tekstojn, rekrei la voĉon de persono (por diri ion ajn!), krei muzikon aŭ filmon, asisti pri programado kaj multon alia. Vi komprenos ankaŭ la *limojn* de tiaj kapabloj. Se la tempo permesos, ni diskutos la socion – kiel ĝi ŝanĝiĝos, kiuj danĝeroj aperas nun, ekzemple pri misinformado, spamado kaj trukado, kial kiel gardi sin. Kaj kiom (mal)verŝajne estas, ke iu AI iĝos konscia, akiros tre detrueman personecon kaj provos finigi la homaron.

## Kiel iĝi kontenta esperantisto kaj homo

*Perspektivoj de stoikismo*

**Gvidanto:** *Jacob*

Ĉu vi volas malkovri, kiel la pensoj de antikvaj filozofioj povas plibonigi vian modernan vivon? Lernu praktikeblajn strategiojn por resti trankvila, feliĉa, kaj en harmonio kun aliaj. Perspektivoj de Stoikismo aplikebla en via ĉiutaga vivo por pli trankvila menso, kun multe malpli da frustriĝo kaj timo.

## Saĝa parolo – kion mezaĝaj esperantistoj bedaŭrinde ne konsciis kiam ili estis junaj

**Gvidanto:** *Jacob*

Estas multaj aferoj, scioj kaj faktoj, kiun ni, mezaĝaj esperantistoj, bedaŭrinde ne konsciis kiam ili estis junaj. Kiel junulo vi venu kaj aŭdi kelkajn aferojn kiuj verŝajne plibonigos vian vivon. Kiel mezaĝulo vi venu kaj diru kion mi mem bedaŭras ke vi ne konsciis kiam vi havis 20-30 jarojn.

## Kion fari por subteni esperantistajn militajn viktimojn de Ukrainio?

**Gvidanto:** *Jacob*

La Esperanto-teamo ĉe Roskilde Festivalo petas vian helpon subteni esperantistojn trafitajn de la milito en Ukrainio. La milito en Ukrainio daŭrigas kaj daŭre estas terura emocia, viva, sana kaj financa problemo por ukrainanoj ĝenerale kaj ukrainaj esperantistoj pli precipe. Nuntempe 6 ukrainaj esperantistoj servas en la ukraina armeo, 1 jam pereis. Iliaj familioj kaj aliaj esperantistoj (rifuĝintoj kaj simplaj homoj) daŭre bezonas (ĉefe ekonomian) subtenon. Multaj perdis laboron, sanon, domojn. Legu pli ĉe mallonge.net/ukrainio .

## Venu al Roskilde Festivalo! Ⓚ

*Senpage manĝu, festu kaj ĝuu 200 koncertojn en Danio*

**Gvidanto:** *Jacob*

Roskilde estas unu el la plej grandaj (pli ol 100 mil partoprenantoj) kaj malnovaj (jam 50 jarojn!) rok- kaj muzikfestivaloj en Eŭropo, kaj laŭ multaj – ankaŭ plej bunta kaj mojosetosa! Laŭ ĝia devizo, RF estas 8-taga festivalo de muziko, arto, aktivismo kaj libereco. Jam de pluraj jaroj ankaŭ Esperantista komunumo havas sian belan kontribuon kaj kunkreas ĝin per kuna amuziĝo kaj laboro. Venu kaj aŭskultu pri ĉi-jara festivalumado kaj kial nepre endas jam aliĝi al Roskilde-Esperanto teamo por 2025.

## Stefan Zweig, eŭropa verkisto

**Gvidanto:** *Arno*

Ĉu vi konas Stefan Zweig, unu el la plej famaj eŭropaj verkistoj? En ĉi-tiu prelego vi malkovros lian vivon, verkaron, kaj humanisman sintenon kiu transcendos landlimojn. Zweig difinis sin ne kiel naciano, sed kiel eŭropano kaj mondcivitano. La prelego estas akompanata de imponaj bildoj – personaj fotoj, librokovriloj, mapoj, kaj pli – kiuj helpas rakonti liajn travivaĵojn kaj klarigi liajn unikajn literaturaĵojn.

Ĉi-tiu programero paralele rilatas al sceneja prezento de lia fama verko *La Ŝaknovelo* kiu okazos la sekvan tagon. Do venu por inspiriĝi kaj pliprofundigi viajn sciojn pri unu el la grandaj verkistoj de la 20a jarcento!

## Fulmprelegoj

**Gvidanto:** *Clarissa*

Ĉu vi havas ion dirindan sed ne vere sufiĉas por propra prelego? Venu al la fulmprelega sesio, volontulu kaj spontanee prezentu kion ajn vi volas diri. Ĉiu partoprenanto ricevos maksimume kvin minutojn; poste estos la vico de la sekva partoprenanto. Ne necesas kunporti propran komputilon, sed se vi volas, vi povas kunporti dosierojn sur USB-bastoneto – aŭ simple prelegi sen iu materialo. Spektantoj povas antaŭĝoji sinsekvon de prelegetoj pri la plej variaj temoj – perfekta por tiuj kun mallonga atentodaŭro kiuj ekdormas post kvin minutoj de la sama!

## La belga ŝtato: ĝia strukturo

**Gvidanto:** *Ben*

Vi scias ke en Belgio oni parolas plurajn lingvojn. Nome la nederlandan, la francan kaj la germanan. Ekde 1970 Belgio spertis kelkajn ŝtatajn reformojn. Oni disigis Belgion ne plu nur en "provincoj" kaj "municipoj" sed aldonis kromajn nivelojn, nome "komunumoj" kaj "regionoj". Venu malkovri la precizajn detalojn pri la komplika strukturo de Belgio.

## Savu la Centran Oficejon!

**Gvidanto:** *Konstanze*

## Enkonduko al LARPumado kaj miniLARPludo

**Gvidanto:** *Demlin*

Mi klarigos al vi kio estas LARPo (Live Action Role Play), kaj kiuj diversaj ĝenroj de LARPumado ekzistas. Temas pri rolludado verviva. Mi donos diversajn ekzemplojn kaj ankaŭ rakontos de miaj propraj spertoj kun LARPumado. Fine, mi enkondukos la miniLARPludon kiun ni ludos posttagmeze, kaj vi povas vidi, ĉu vi emas partopreni ĝin.

## Kvantuma fiziko

**Gvidanto:** *Vittorio*

Kio estas kvantuma fiziko? Kiel ĝi funkcias, al kio ĝi utilas? Post eta prelego pri tiu ĉi interesa teorio ni provos kompreni kune siajn bazajn principojn pere de ciferecaj kaj konkretaj eksperimentoj. Mi proponos al vi kvizojn kaj ni diskutos kune pri la rezultoj. Se vi havas neniun antaŭkonon nek de kvantuma fiziko nek de fiziko ĝenerale ne timiĝu! Ĉiuj homoj bonvenas!

## Prelego pri BEMI-karavano

Ⓚ

**Gvidanto:** *Lars*

Aŭdu kaj vidu pri la aventuroj dum la vintra BEMI-karavano el Arnhem al JES, kaj pri aliaj BEMI-agadoj dum la jaro.

## Prezento de Globasa

*La moderna helplingvo kie vortoj venas de la tuta mondo*

**Gvidanto:** *André L.*

Kiel aspektus lingvo kun eŭropaj vortoj, sed ankaŭ vortoj de la mandarena, la hindustana, la araba, la indonezia, la svahila, la japana kaj multaj aliaj? Kiel gramatiko povus esti eĉ pli facila (aŭ almenaŭ malsama) ol tiu de Esperanto? Se la gramatiko de konstruita lingvo interesas vin aŭ se vi ŝatas rekoni vortojn de multaj lingvoj, nepre venu!

## Historio de poparto

*La kunfluo de populara kulturo, amasa konsumismo kaj belartoj*

**Gvidanto:** *Jordan*

Kiel etikedo de supkonservaĵo transcendias sian rolon kiel ĉiutaga objekto por fariĝi belarto? En ĉi-tiu prelego, ni esploros la evoluon de poparto en Novjorko, de ĝiaj radikoj en la bildoj de konsumismo ĝis ĝia rolo kiel platformo por socia kritiko. Lernu pri la ikonecaj artistoj, kiel Andy Warhol, Roy Lichtenstein kaj Keith Haring, kaj pri la unikaj kondiĉoj, kiuj igis Novjorkon la centron de la movado. Se vi ŝatas arton, kulturhistorion aŭ simple novajn perspektivojn, ne maltrafu ĉi-tiun okazon!

## Eta panoramo de la brazila muziko

Ⓚ

**Gvidantoj:** *Rafael, Muniz, Moyz*

La vasta kultura diverseco de lando kun kontinentaj dimensioj, kiel Brazilo, estas fascinanta. Dum ĉi-tiu neformala babilado kun la membroj de la bando Barok-Projekto, la rokmuzikistoj prezentas tradiciajn muzikajn temojn el diversaj brazilaj regionoj, montrante iom pri tio, kio kaŝiĝas malantaŭ la furiozaj gitaroj de la bando.

## Enkonduki neŭtralan internacian lingvon ĉe Volt

**Gvidanto:** *Bart*

Volt estas la nura partio kiu havas membrojn en ĉiuj EU-landoj. Ĝi havas jam seĝoj en diversaj urboj, landoj kaj eĉ 5 en la eŭropa parlemento. La klimatfavora, sociala kaj eŭropa programo allogos multajn Esperantistojn. Ĝia pensmaniero donas grandan ŝanĉon por aprobi neŭtralan internacian lingvon. Ĉu vi pretas helpi?

## Almadén: la du vizaĝoj de hidrargo

**Gvidanto:** *Frank*

Jam en antikveco la minejoj apud la hispana vilaĝo Amaldén estis famaj pro sia cinabro – bela ruĝa mineralo, per kiu oni ornamis objektojn kaj konstruaĵojn ĉirkaŭ la tuta Mediteraneo. Sed la ruĝa mineralo entenis eĉ pli belan trezoron. Varmigante ĝin, oni povis liberigi la solan metalon kiu estas likva je ĉambra temperaturo: hidrargo. La glimanta, fluanta metalo fascinis la homaron dum jarmiloj, sed unu apliko igis ĝin speciale valora. Tiel valore ke ĝi alportis neimageblan riĉecon, sed ankaŭ militon kaj suferadon. Venu al mia prelego por la tuta rakonto!

## Malkovru la plej mojosan FESTOn ekde jardeko! (K)

**Gvidantoj:** *Gabin, David*

Post tre longa paŭzo (11 jaroj), FESTO okazos denove! Festu kun ni dum tutsemajna renkontiĝo kun tre forta muzika programo, organizita de JEFO en aŭgusto 2025 en Moissac, Francio! Ĉu vi volas scii pli? Venu kaj starigu viajn demandojn!

## Kio estas la Verdaj Skoltoj? (K)

**Gvidantoj:** *Bubalo, Magoto*

Kiam ekis tiu grupo? Kial ili subite kantas strangajn kantojn? De kie ili venas? Kial ili estas ĉie en Esperantujo? Ĉu komencantoj bonvenas? Ĉu ili konstante serĉas taskojn? Kial ili havas besto-nomojn? Ĉu ili naskiĝas kun flava ĉemizo? Ĉu mi rajtus partopreni? Post mallonga prezento, Bubalo kaj Magoto respondos al ĉiuj viaj demandoj!

## La persa lingvo

**Gvidanto:** *André M.*

La persa lingvo kun siaj 3 ĉefaj oficialaj dialektoj (irana, daria, taĝika) estas parolata en Irano, Afganio kaj Taĝikio. Kvankam ĝi estas skribata per variaĵo de la araba alfabeto, ĝi estas hindeŭropa lingvo kun multaj similaĵoj al la romanidaj, ĝermanaj kaj slavaj lingvoj. Esploru ni do kune la fundamenton de la (irana) persa lingvo. Kiel ĝi elparoliĝas, kiel funkcias la gramatiko, kiel oni konstruas simplajn frazojn? Eble tio montros al vi, ĉu tiu belega lingvo kun sia riĉa literatura kulturo estas iam lerninda. *Mâ bâham in zabâne ĝâleb râ jâd begirim!*

## Arcaicam Esperantom

**Gvidanto:** *André M.*

Esperanto ja ekis en 1887 kiel konstruita lingvo. Se ĝi estintus natura, evoluiĝinta lingvo, kiel ĝia pra-formo aspektus? Nu, Manuel Halvelik inventis en 1969 formon de Esperanton, kiun oni povus imagi, ke ĝi paroliĝis antaŭ multcent aŭ eĉ mil jaroj, simile al aliaj malnovaj praformoj de naturaj lingvoj, kiujn oni hodiaŭ pli aŭ malpli komprenas sen profunda studado. Arcaicam Esperantom ne celis esti nova planlingvo, sed arta formo de Esperanto, uzata ekzemple en romanoj aŭ rakontoj por montri iuspecan antikvecon. Kun siaj reguloj, (mal)novaj vortetoj kaj malsimila ortografio, ĝi estas parolebla kaj amuza „dialekto“ de nia kara lingvo. *Lasuy nos cumœ heyon isityes Lingwes nowes lernir!*

## 19 jaroj da TEJO-agado

**Gvidanto:** *Michael Boris*

Ĉu vi scivolas pri la evoluo de TEJO kaj nia movado en la lastaj du jardekoj? Ĉu vi volas aŭdi spertojn kaj anekdotojn de homo kiu aktivas en TEJO de 19 jaroj kaj nun alvenas al la fino de sia junulado? Michael Boris Mandirola invitas vin al sia prelego, kie li rakontos ne nur pri siaj propraj spertoj en TEJO, sed ankaŭ pridiskutos propravidpunkte la evoluon kaj defiojn de la movado ekde tiam. Ne maltrafu la okazon por inspiriĝi, lerni, pripensi kaj starigi viajn proprajn demandojn!

## Varsovia Vento "la orgasmon radian ni ne havas trooooo" (K)

**Gvidanto:** *Irek*

Surbaze de la internacia kurso en 1991 aperis en Varsovio internacia klubo Varsovia Vento. Internacia, ĉar partoprenis ĝin ankaŭ geknaboj el la usona kaj irlanda ambasadejoj. La agado de la klubo ekde komenco ne estis ordinara proponinte la eldonadon de la propra revuo, aktivadon en la foto- kaj teatro-sekcioj, trejnadon pri organizado de la eventoj (pro tio inter alie ekzistas ankaŭ la JES), krome instru-trejnadon por la plej spertaj lingve. Ekde 2006 aliĝis al tiuj kaj ankoraŭ kelkaj aliaj proponoj ankaŭ agado ĉe la radio-programoj forme de podkasto. Tiam naskiĝis nun sufiĉe populara kaj konata en Esperantujo podkasto Varsovia Vento. Ĉu valoris eki tiun branĉon de la kluba aktiveco? Kiel ĝi evoluis kaj kial varolas pri ĝi plu okupiĝi? Al tiuj, kaj ankaŭ al aliaj demandoj vi ricevos respondojn dum la renkontiĝo kun la fondinto de la agado.

## Pri kio kantas la esperantistaj artistoj

**Gvidanto:** *Irek*

Unu el la branĉoj de la esperantista kulturo estas muziko. Ni aŭkultas ĝin, ĉe ĝi ni pasas distran tempon, dancas, sed ĉu ni scias, pri kio kantas la esperantistaj artistoj? Pri kio ili deziras rakonti, kion ili ŝatus mesaĝi? Ĉu la esperantista muziko influas evoluon de la lingvo? Ĉu pli kaj pli facila kreo de la muzikaj pecoj helpe de AI iĝas danĝera por agado la esperantistaj muzikistoj? Bonvenon al la film-muzika prezentado kun diskuto pri la temo.

## Kaoso en vortaro de plantoj

**Gvidanto:** *Irek*

Plantoj plibeligas niajn hejmojn, ĝardenojn, kono pri ili helpas ĉe kuracterapioj kaj ankaŭ dum kuirado. Sed, kio ne estas nova por la esperantistaro, en la paperaj kaj retaj vortaroj mankas nomoj de ĉiuj el inter iom pli ol 17 mil genroj, al kiuj krome apartenas miloj da specioj. Dum kelkjara kolektado de la esperantigitaj planto-nomoj en diversaj publikaĵoj evidentiĝis, ke unu havas foje du, tri aŭ eĉ pli da esperantigoj. Kiel do interkompreniĝi internacie, se pri sama planto unu diras galanto kaj la alia neĝborulo? Se vi interesiĝas pri plantoj, deziras scii iliajn nomojn en Esperanto, bonvenon al tiu programero, dum kiu vi ekscios ankaŭ pri ekzisto de la plena vortaro de plantoj.

## Belgio, la lando kiu malpermesas lingvon!

**Gvidanto:** *Valère*

Lupo prezentos al vi la lingvajn regulojn de Belgio. La lando kiu malpermesas lingvojn, havas etnajn identkartojn, rifuzas nombri parolantojn, kie eĉ la rubujo devas esti nurunulingva!

# Atelieroj

## Ni kune kreu muzikon per AI!

**Gvidanto:** *Jacob*

Ni kreos kantotekstojn per AI, redaktos ilin kaj tranformos ilin al ludata muziko en diversaj ĝenroj, kiel repo, hiphopo, dancmuziko, pezroko, tekno balado aŭ iun ajn alian stilon kiun vi ŝatas! Aliĝu per suno.com/invite/@roskildefestivalo kaj malfermu https://mallonge.net/muzikkreado por partopreni. Pensu pri iu temo, pri kiu vi volas fari muzikon. Eble ni kreos JES-kanton, eble io por la nokta diskejo. Intereso sufiĉas, vi ne bezonas povi mem ludi aŭ kanti. Prefere kunportu komputilon kaj orelaŭskultilojn.

## Ni kune ludu per AI

**Gvidantoj:** *Jacob, Gert*

Multaj iloj de AI tre bone funkcias en Esperanto, sed oni devas foje scii kelkajn trukojn. Ni kune ludos per generativa AI, kreos muzikon kaj kantojn, voĉbabilos kun robotoj, uzas ilin por informserĉado, provlegado, tradukado, ideokreado, programado, bildokreado ktp. Ni disdividos niajn bonajn (kaj malbonajn) spertojn kaj kune lernos kiel ni povas profiti. Kunportu komputilon se eblas.

## Teatro-ateliero

**Gvidantoj:** *Lampido, Arno, Christoph*

Ĉu la scenejo vigle alvokas vin? Aŭ ĉu vi nur ekinteresiĝas? Ĉu vi ŝatus malkovri kiel krei spontanecon el ĉiaj situacioj, aŭ sentigi la emocion de ajna teksto? Ĉu vi ŝatus transformi vian korpon el fonto de malkomforto al fonto de sentemo? La teatraj atelieroj esploros tiujn temojn kaj multe pli -aldoniĝu al plurtaga malkovro de tiu arto!

## Biergustumado Ⓚ

**Gvidanto:** *Valère*

Post klarigo pri bierfarado, ni kune gustumos kelkajn bierojn. Unua biergustumado temos pri belgaj stiloj. Klasikaj kaj modernaj. Ni gustumos 6 bierojn. Dua biergustumado temos pri novstilaj bieroj. Ni ĉefe gustumos IPA-bierojn kaj Stout-bierojn. Ni gustumos 4 bierojn.

## Baza brodado Ⓚ

**Gvidanto:** *Anežka*

Personigu viajn ŝtofaĵojn! Materialo disponebla.

## Kune krei ornamaĵojn por la silvestro Ⓚ

**Gvidantoj:** *La esploristoj*

Ni kune kreos ornamaĵojn por belegi la salonojn.

## Kuirarta Ateliero: Vegana Döner Kebab 1

(K)

**Gvidanto:** *Frico*

La legendeca, turka-german-internacia, postfesta, bongusta Döner Kebab estas sperto konata ĉirkaŭ la mondo. Ĉu eblas mem krei tiun sperton? Ĉu eblas eĉ veganigi ĝin? Bonŝance ja eblas dum tiu-ĉi JES! Venu al la unua programero por ekscii, kiel fari veganan Döner Kebab viandon el tritika gluteno (Seitan).

## Kuirarta Ateliero: Vegana Döner Kebab 2

(K)

**Gvidanto:** *Frico*

La legendeca, turka-german-internacia, postfesta, bongusta Döner Kebab estas sperto konata ĉirkaŭ la mondo. Ĉu eblas mem krei tiun sperton? Ĉu eblas eĉ veganigi ĝin? Bonŝance ja eblas dum tiu-ĉi JES! Venu al la dua programero por sperti la preparadon de ĉiuj bongustaj legomoj kaj saŭcoj. Poste vi povas mem kombini ilin por krei tiun plej salivigan sperton: VEGANA DÖNER KEBAB!

## Kontraŭĥoruso

(K)

**Gvidanto:** *Konstanze*

Ĉu vi ne kantas aŭ ne memfidas pri kantado? Ĉu vi ludas instrumentojn aŭ havas longjaran sperton en ĥorusoj? Tute ne gravas! Venu por liberigi vian voĉon kaj eksperimenti kun muziko kaj bruo. Ĉia voĉo bonvenas. Ni forkriu la pasintan jaron kune ĉe kontraŭĥoruso!

# Kursoj

## Esperantokurso por komencantoj

(K)

**Gvidanto:** *Konstanze*

Esperantokurso por nivelo A1.

## Esperantokurso por progresintoj

**Gvidanto:** *David*

Esperantokurso por nivelo B1.

## Enkonduka kurso pri la (belga) nederlanda lingvo

(K)

**Gvidanto:** *Ben*

Vi scias ke en Belgio oni parolas tri oficialajn lingvojn. La franca estas unu el ili. Nome la oficiala lingvo en Valonio, kie JES okazas. Belgio nombras pli ol 4.500.000 franclingvaj enloĝantoj. En ĉi tiu kurso vi ekmalkovras la francan lingvon. Venu kun via propra frazo por traduki. Ni ankaŭ aŭskultos kaj pristudos kanton belgan.

## Enkonduka kurso pri la (belga) franca lingvo

(K)

**Gvidanto:** *Ben*

Vi scias ke en Belgio oni parolas tri oficialajn lingvojn. La franca estas unu el ili. Nome la oficiala lingvo en Valonio, kie JES okazas. Belgio nombras pli ol 4.500.000 franclingvaj enloĝantoj. En ĉi tiu kurso vi ekmalkovras la francan lingvon. Venu kun via propra frazo por traduki. Ni ankaŭ aŭskultos kaj pristudos kanton belgan.

## Magota danckurso

(K)

**Gvidanto:** *Magoto*

Ĉu vi interesiĝas pri danci ion alian ol la bambo? Venu kaj provu la diversan pejzaĝon de k-pop koreografioj je ĉi-tiu danckurso! Vi ne bezonas havi altan nivelon de dancado, ĉar vi ankaŭ mem rajtas elekti el serio de kantoj kiun mi antaŭvidis (aŭ mem demandi se vi emas lerni iun specifan!) kun pluraj gradoj da malfacileco.

## Skotaj popoldancoj

(K)

**Gvidanto:** *Duncan*

En Skotlando dum novajara festo, kaj tre ofte ankaŭ en aliaj festoj, ekzemple geedziĝaj, oni faras popoldancojn. Mi instruos al vi plurajn el tiuj. Dancoj estos paraj, triopaj, kvaropaj, kaj aliaj. Venu sola, aŭ venu kun amikoj, ĉiukaze vi renkontos novajn homojn!

## Francaj popoldancoj

Ⓚ

**Gvidanto:** *Neĝpantero*

Folkloraj dancoj de francaj regionoj kaj eŭropaj. Ili estas tre diversaj kaj facile lerneblaj. Ili povas esti paraj dancoj, solaj, grupaj, en ĉeno.

## Ĵongladkurso

Ⓚ

**Gvidanto:** *Paula*

Ni kune povas ĵongli kun pilkoj. Vi ne bezonas iun antaŭkonon.

## Rapidec-tabulludo *Ligretto* – instruado kaj ludado

**Gvidantoj:** *Bubalo, Amélie, Frida*

Ni instruas al vi ludi amuzan rapidec-tabulludon *Ligretto*. Venu disdoni la komunan etoson ludante al tiu vivanta ludo. Kaj se vi ŝatas ĝin venu partopreni la konkurson kiu okazos dum la posttagmezo!

## Enkonduko al Forró: Brazila Ritmo kaj Danco!

Ⓚ

**Gvidanto:** *João*

Eksciu pri Forró, la gaja kaj energia popola danco el Brazilo! Dum la kurso, ni lernos la bazajn paŝojn kaj movojn, kiuj faras ĉi tiun dancon tiel amuza kaj proksimiga. Ne gravas via antaŭa sperto – ĉiuj estas bonvenaj por ĝui la etoson kaj lerni danci Forró-stile!

## Lindy Hop danckurso

Ⓚ

**Gvidantoj:** *Spencer, Lilian*

Lindy Hop estas ĝojiga duopa danco, tre internacia, kiun oni dancas laŭ svinga ĵazmuziko. Ĝi ekestis antaŭ 90 jaroj en Usono, kiam oni kombinis la strukturon de formalaj duopaj dancoj el Eŭropo kun la movoj kaj kreemo de tradiciaj dancoj el Afriko. Ĝi similas al Rock 'n' Roll kaj Jive, kiuj evoluis el ĝi, sed Lindy Hop daŭre estas iom pli libera kaj ludeca. La lecionoj estas memstaraj, taŭgaj por komencantoj, kaj ĉiufoje kun alia enhavo. Ne necesas kunporti partneron.

# Ludoj

## MiniLARPumi loĝkomunumon kaj la evoluon de vivo

**Gvidanto:** *Demlin*

*Iel ĉio ĉi sentiĝas kiel hejme* estas mini-LARPludo por 5-8 ludantoj. Oni ludas amikgrupon kiu iam longe loĝis kune, kaj nun disiĝas kaj ekiras en la mondon. La ludo temas pri nostalgio, amikeco kaj persona evoluo de vivo. Ĝi okazas en 6 scenoj kun tempo-saltoj, kaj la unua sceno estas la adiaŭo de la loĝkomunumo. Poste trafas multaj vivŝanĝoj la ludantojn kaj ili rerenkontiĝas kiel grupo de tempo al tempo tra la jaroj.

Bonvolu veni al la antaŭtagmeza *Enkonduko al LARPumado* por prepariĝi kaj sciigi min, ke vi kunludos. Ĉi-tio estas fermita programero sen spektantoj.

## Powerpoint-karaokeo

**Gvidanto:** *Clarissa*

Ĉu normala prelego? Ne vere: la preleganto neniam antaŭe vidis la prezentad-materialon kiu estas montrata per la projekciilo, nek scias ion pri la temo – kaj devas spontanee diri ion ajn … kaj kompreneble la sekva paĝo povas enhavi surprizojn. Venu kaj volontulu kaj mi donos al vi hazardan prelegon. Ne necesas kunporti propran komputilon, nur kuraĝon kaj kreemon, simile al improviza teatro. Kaj se vi ne kuraĝas partopreni, venu por spekti!

## Rapidec-tabulludo *Ligretto* – la konkurso (K)

**Gvidantoj:** *Bubalo, Amélie, Frida*

Venu defii la aliajn *Ligretto*-ludantojn dum etosplena konkurso. Post alfronti la lastan majstron, vi eble povos ricevi LA premion de la venkinto!

## Kukumio, lingvopolitika ludo

**Gvidantoj:** *Konstanze, Michael Boris*

Vizitu Kukumion! En tiu ĉi elpensita lando, loĝas diversaj popoloj kiuj parolas malsamajn lingvojn. Ili ricevas malfacilan taskon: elpensi novajn lingvopolitikojn! Rolludu grupe por lerte defendi la interesojn de via popolo!

## Rolludo *Pasaĵoj*

**Gvidantoj:** *Delfeno, Lampido*

*Pasaĵoj* estas potenca simula ludo, kiu gvidas partoprenantojn tra la defioj kaj emocioj de esti rifuĝinto. Per rolludado, ĝi kreas profundan komprenon pri temoj kiel familia disiĝo, malcerteco, kaj adaptiĝo al novaj medioj. Ĉu vi pretas sperti momenton de empatio kaj esplori la realojn de tiuj, kiuj serĉas sekurecon en fremda mondo? Aliĝu kaj malkovru, kiel ni ĉiuj povas fari diferencon!

Atentu: dum la ludo oni moviĝos tra la tuta JESejo, do vestu vin ankaŭ por ekstere kaj kunportu plejeble malmultajn aĵojn. La kunvenejo je la komenco estos la salono *Nesto*.

# Diskutrondoj, babilrondoj, kunsidoj

## Asembleo de Germana Esperanto-Junularo

K

**Gvidanto:** *Michael*

La membroasembleo de Germana Esperanto-Junularo (GEJ) okazas ĉiujare. En ĝi, membroj de GEJ kunvenas, diskutas kaj decidas pri la sekvaj paŝoj de sia asocio. Diversaj tagorderoj estas planitaj, interalie agadraporto de la ĝisnuna estraro, prezento de financa bilanco, raportoj el laborgrupoj kaj, plej grave, elekto de nova estraro por 2025-26. Kiu iĝos la nova prezidanto de GEJ? Kaj kiu iĝos kasisto? Kiu – vicprezidanto? (Ĉu eble vi?) Iru eltrovi ĉion ĉi dum la membroasembleo de GEJ. Por partopreni ĝin kun voĉdonrajto, vi devas esti membro de GEJ. (Ĉu vi jam membriĝis?) Sed ankaŭ gastoj (ne-membroj) volonte povas ĉeesti kaj observi.

## Membrokunsido de BEMI

**Gvidanto:** *Lars*

BEMI invitas ĉiujn membrojn al sia tradicia membrokunveno dum JES. La membrokunveno estas la supera organo de BEMI kaj decidas pri ĉio en nia asocio. Memoru ke en BEMI ne ekzistas formala membreco – ni invitas ĉiujn homojn, kiuj parolas Esperanton kaj ŝatas bicikli, konsideri sin membroj. Se tiu kondiĉo estas vera por vi, vi povas veni, diskuti kun la aliaj membroj, kaj decidi. Vi estas same bonvena se vi nur volas aŭskulti, kio ĉio okazis en BEMI dum la pasinta jaro, kaj kiujn mojosajn aferojn ni planas por la venonta.

## Aligatorejo

K

**Gvidanto:** *Anna*

Welkom in de aligatorejo! L'aligatorejo est un cercle de discussion informel, aber man darf kein Esperanto sprechen, und auch nicht seine Muttersprache. It's a great opportunity to practice your other languages! Si eres amante de los idiomas, você não vai querer perder isso! Sluit je aan bij een groep en ontdek czy macie wspólny język oprócz esperanto! Akár egy beszélgetés közepén is válthatsz egy másik nyelvre, porque tu compañero no puede usar el mismo idioma que tú estás usando. Allena il tuo cervello door constant van taal te veranderen! Kom og ha det gøy!

## Novula programo

K

**Gvidanto:** *Michaela*

Se JES estas via unua granda Esperanto-evento, aŭ se vi miras, kio okazos dum JES, aŭ se vi volas iĝi mentoro por novuloj, venu al la novula programo. Ni interkonatiĝos, ludos kaj lernos pri la specialaĵoj de JES, pri ĝiaj programeroj, kiel trovi helpon kaj diskutos, ĉu vi sentas vin komforta. En kazo de dubo vi ĉiam ajn rajtas kontakti min telegrame: @michaelaherzberg

## Kiom da homoj parolas Esperanton?

K

**Gvidanto:** *Tyron*

Kiom da homoj parolas Esperanton? Estas simpla demando, sed la respondoj multe varias, kun taksoj inter kelkaj miloj kaj kelkaj milionoj da parolantoj. En tiu ĉi programero ni esploros la temon, kaj fine voĉdonos pri tio, kion ni (kolektive) opinias.

## JunulUN

**Gvidanto:** *Ikvero*

*Model UN* (Junul-UN) estas tre ofta praktiko en universitatoj kaj tre populara ĉefe inter junuloj, kiuj ŝatas ekzerci siajn retorikkapablon kaj elokventecon en formalaj kuntekstoj samtempe, ke lernas pri formalaj organizoj kiel Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, ekonomiaj blokoj, ks. La celo de tiu programero estas elpensi kiel tion ni povus fari en Esperantujo! En rapida diskuta sesio, ni lernos pri la funkciado de Junul-UN, ĝiaj reguloj, ktp., kaj kune diskutos pri kiel tio povus iĝi realeco en Esperantujo.

## Ĝenerala Asembleo (Algemene Ledenvergadering) de NEJ (K)

**Gvidanto:** *Arnold*

Dum la Ĝenerala Asembleo de NEJ (Nederlanda Esperanto-Junularo / Nederlandse Esperanto-Jongeren) ni elektas novan estraron, parolas pri la buĝeto kaj la eventoj de la jaro 2025. Ĉiu membro de NEJ, kaj aliaj homoj kiuj interesiĝas pri NEJ, estas bonvenaj.

# Ekskursoj

## Bicikla ekskurso

K

**Gvidanto:** *Ivo*

Esploru kun ni ĉi-tiun angulon de la Ardenoj per biciklo. Kutime, BEMI-ekskursoj estas facilaj bicikladoj. Sed ni ja estas en montaro, kaj estas vintro. Do vere facila la ekskurso ne povas esti. La itineron ni elektos en lundo mem laŭ la veterprognozo kaj la kondiĉoj sur la vojoj. Kaj laŭ viaj deziroj. Ebloj estas multaj. Vestu vin taŭge kaj ĝuu specialan biciklοposttagmezon kun ni.

## Eksurso al Bruselo

K

**Gvidanto:** *Tabatha*

La 2a de januaro estas la lasta tago de JES kaj vi estos bonvenita al vizito de Bruselo. Laŭ la vetero ni faros planon A (sen pluvo) aŭ B (malbona vetero).

Plano A: Ni vizitos piede la urbocentron de Bruselo, kun historiaj (mi estas historiisto) kaj personaj anekdotoj pri Bruselo. Praktike, eblas lasi pakaĵojn en la centra stacidomo, vidu ĉi-tie .

Plano B: Se pluvas kiel kutime en Belgio ni iros al la Belaj Artoj Muzeo. Vizito estos aŭ libera aŭ en grupo, kun kelkaj anekdotoj aŭ kunaj komentoj/kritikoj. Ekzistas du muzeoj ene de unu: Belaj artoj kaj Magritte.

Praktike, la muzeo petas biljeton kaj havas pakaĵejon. Vidu la prezojn ĉi-tie (3, 5, 10 aŭ 15€ laŭ studento aŭ ne, unu aŭ du muzeoj.)

Por ambaŭ praktike : Ni prenos trajnon el Lieĝo ĝis Bruselo centra stacidomo, en la urbocentro kaj apud la muzeo. Estas unu aŭ du trajnoj/horo kaj la vojaĝo el Lieĝo daŭras unu horon. La prezoj estas videblaj ĉi-tie (se vi estas malpli ol 25 jaraĝa prenu GO PASS – ĝi kostas 7,50€, se ne kostas 17,80€). Plej multaj de la internaciaj trajnoj foriras el Bruselo Suda stacidomoj, busoj el suda aŭ norda stacidomo, ambaŭ facilege atingeblaj kaj via bileto validas. Se vi iras al flughaveno Bruselo (prenu trajnon), aŭ Charleroi (prenu buson aŭ trajnon + buson), vi bezonas alian bileton.

## Vizito al IEspA

K

**Gvidanto:** *Marc*

En aprilo 2024 la Internacia Esperanto-Arkivo sukcesos aĉeti taŭgan ejon por konservadi la plenan arkivon: amaso da libroj, revuoj, dokumentaj arkivoj kaj objektoj en kaj pri Esperanto. Pri la arkivo mem legu en www.iespa.eu kie ankaŭ troviĝas kelkaj fotoj.

Vi povos viziti la arkivon lau sia nuna stato: la renovigo estas preskaŭ finita kaj parto de la arkivo jam troviĝas surloke. Vi povos do propraokule sperti kiel IEspA savas por estonto la pasinton de Esperanto.

Praktike: alvenu ĉe IEspA en jaŭdo 2-a de januaro 2025 inter la 11a30 kaj 13a30. Vi povos surloke manĝi kunportitan manĝon, trinkaĵoj haveblas ĉe ni. Post la vizito eblos per gvidata promenado konatiĝi kun Diest: de IEspA ĝis proksime de la stacidomo, fino nepre antaŭ la 17a (aŭ 16a se oni tiel decidos surloke). Bonvenon ĉe IEspA: Hasseltsestraat 26 en 3290 Diest.